# AVENO 43

Septembro 2017



**Karaj geamikoj,**
jen tute konciza AVENO – sen la detalaj informoj pri ekologio, ekonomio, paco-politiko, Homaj kaj Bestaj Rajtoj, kaj pri Verdaj Partioj. La kompleta kolekto de nia semajna reta AVENO trovighas en nia retejo: **www.verduloj.org/aveno.htm**
La Asocio de Verduloj Esperantistaj estas malgranda Civil-Socia Organizaĵo; ni estas nura reto da homoj, neformala asocio. AVE-anoj parolas Esperanton kaj estas Verduloj (membroj aŭ simpatiantoj de Verdaj Partioj) favoras ekologian, socialan, pacan kaj viv-subtenan politikon. AVE pensas pri la tuta mondo; niaj membroj agas surloke. Ni celas informi niajn geamikojn en politiko kaj en CSO, respektive Ne-Registaraj Organizaĵoj pri la avantaĝoj de Esperanto kaj reciproke.

**Renkontiĝoj de AVE:**
2018-07-29 Lisbono, UK: publika kunveno, elekto de nova sekretario.
**Okazis:**
2017-03-30/04-02 Liverpool (GB), Tutmonda Kongreso de Verdaj Partioj: greens2017.0rg
2016-07-16/23 SAT-Kongreso en Herzberg. Kunsido de la ekologia frakcio.
2015-07-27 Lille, 100a UK: publika AVE-kunsido Temoj: Agendo 21 & Dauropovo en la Esperanto-Movado. Trinkakvo por Kalima – Koran Dankon !

**Historio de AVE:** AVE estis fondita 1984 en Liège (Belgio) okaze de la unua renkontiĝo de la Eŭropaj Verdaj Partioj. verduloj.org/ave_hist.htm

**Celoj:** Informi niajn geamikojn en politiko kaj en Civil-Sociaj Organizaĵoj pri la avantaĝoj de Esperanto kaj informi niajn esperantistajn geamikojn pri la neceso de Verda Politiko.

**Agado:** AVENO estas nia bulteno; informas pri ekologia, sociala, paca kaj viv-subtena politiko de la Verda Movado kaj Partioj.
Nia diskutlisto “Verduloj” che ipernity.com

Ni subtenas projektojn de esperantistoj:
Detale: **verduloj.org/afriko.htm**
**Mazingira** (nord-okcidenta Tanzanio) de Mramba Simba en Salama & Ketare: Agadoj: trinkakvo, biogaso, re-arbarigo, kuiri ligno-shpareme, mikro-kreditoj, radio-stacio, sunflora oleo. Subtenis financi operaciojn de infanoj.
**Orfoj**: daura subteno,, pagante lernejokotizon 20/40 Euro. Konstruado de dua mez-lernejo „Esperanto Secondary School", kie helpis esperantistoj mane kaj finance.
2016 por pluvakvo-baseno: por ghardenoj kaj bestoj – lasi grundakvon por homoj.
2017 ni kolektis por gastejo por lernantinoj.
Adreso: c/o Mramba Simba Nyamkinda, P.O.Box 51, BUNDA, Tansania. www.kono.be/mazingira/

**PIEADC** en Kalima, D.R. Kongo, tie Etienne Katchelewa (ekkn-y) organizis por reaktivigi agro- kaj fish-kulturadon, solubra trinkakvo: www.kamparanasolidareco.weebly.com
AVE organzis financadon por 3 trinkakvo-projektoj. Aktuale ni kolektas por la 4-a, kaj petas subtenon por „Kalima“ al nia UEA-konto.

**„Uvira**“, Suda Kivuo, D.R. Kongo - Martin Fadhili :
- lernopago por **orfoj** (momente ni subtenas 2 )
**- Rearbarigo** kaj ĝardeno-projekto (malgranda projekto ghis 600 Euro komence de Augusto 2017): Necesas pli efikaj kuir-fornoj au sun-fornojn, por redukti uzon da ligno-karbo. Kune kun lernantoj li intencas kultivi arbidojn kaj poste planti ilin en la regiono de Uvira (proksime de la lago Tanganjika) por replanti arbarojn. Wangari Maathai, nobelpremiitino el Kenio, instruis, ke rearbarigo estas la kondiĉo por teni la akvon en la regiono, kaj ricevi pli da pluvo kaj trink-akvo.

Por la **Verdaj Partioj kaj la Movado** ni informas kaj tradukas: Civila Krizo- kaj Konflikt-Solvado ; Ĉarto de la Tutmondaj Verduloj, 2012 (Dakar) : globalgreens.org/globalcharter
Ĝenerala Konvencio pri la Komerco en la Servoj; Programoj de la Europa Verda Partio, 2006, 2014; pri Verda & Regionalista EP-Frakcio, 2004-2009; gruene-jugend.de/grune-jugend-internationale/ ;

100 Bonaj Argumentoj kontraŭ Atomenergio;
Plastajhoj k. kemiajhoj en la maro & akvaroj;
Konsiloj pri Efika Uzado de Energio;
Dauripova agrikulturo, fekunda grundo; k.a.;
K.t.p.: verduloj.org > Dokumentoj

**2017 la informo pri EELV notas:**
"Nous soutiendrons une langue neutre internationale telle que l’espéranto."

**UEA:** AVE estas kunlaboranta fakasocio de UEA pri ekologio. Ekde 1998 ni proponadas amendon de la UEA-Statutoj per la temo "dauripovo" - lau la Pinto-Kongreso pri la tutmonda naturmedio en Rio de Janeiro 1992, Rio+20, Agenda_21.
AVE kunlaboras kun aliaj CSO-oj.

Por **membrighi** al AVE ne necesas esti membro de iu Verda Partio, sed vi devus akcepti niajn celojn. AVE havas ch. 320 membroj. Bonvolu informi nin se vi aktivas (pli aŭ malpli) en iu ajn NRO/CSO aŭ partio. Bonvolu membriĝi en Verda Partio de via lando – vizitu globalgreens.org/-federations > About us > Green Federations > trovu vian kontinenton – kaj partion.

**Kontribuoj bonvenaj** pere de artikolo kaj kunlaboro en via-landa Verda Partio au CSO.
Ni preferas koncizan tekston (rtf): (ch-u, cx-ux)

AVE-Kotizo: libervole jare paginda: 5+x Euro
**UEA-Konto de AVE:** „avex-z“ au al la bank-konto de UEA: ING: BIC/SWIFT: INGBNL2A, IBAN: NL72INGB0000378964.
Bonvolu mencii:(via nomo, projekto, por avex-z)

AVE sekretario: Manfred Westermayer
Kandelstr. 62,
DE-79194 Gundelfingen/Brsg
ave@verduloj.org
retejo: verduloj.org

**AVE-anoj pensas tutmonde & agas surloke kaj regione.**